

UDK 001(05)=089.2

YU ISSN 0048-9557

SCIENCA REVUO

Vol. 26, n-ro 4/5 (114/115),
30.10.1975.

 Aperas 6-foje jare. Jarabono 56 steloj, 15 ned.gld., 6 us.dol., 100 jugdin;

FILOLOGIA (DUOBLA) NUMERO 8/9

(Kunredakto kaj lingva kontrolo de Prof. S. Ĝuĝev, Sofio, Bulgario)

ENHAVO:

- D. Blanke: La antikvaj lingvoj kaj la problemo ...monda helplingvo
 A. Lienhardt: Pri la kompleksaj vortoj en Esperanto
 M. Gomes: La karakteroj de la geografiaj propraj nomoj
 A. Lienhardt: Apliko de la mediala voĉo por eksplici ..pasivaj participoj
 W.A.H. Themaat: La akuzativo kaj la direkta n ĉe lokaj adverboj...
 H. Traunmüller: Rimarko pri la lingvouzo de diversetnaj verkistoj
 W.A.V. Themaat: La frazakcento en Esperanto
 S. Tornyai: Pri uzo de prepozicio PO

LA ANTIKVAJ LINGVOJ KAJ LA PROBLEMO DE INTERNACIA MONDA HELPLINGVO

(D. Blanke, BERLIN, D.D.R.)

Pro la rapidega evoluo de la produktivaj fortoj en nia jarcento la kvanto de utiligendaj sciencaj informoj grave kreskas. Laŭ esploroj de UNESKO la duono de la sciencaj informoj estas publicita en lingvoj, kiujn la duono de la enketitaj scienculoj ne scipovas /1/. Do objekte ekzistas problemoj de informado, kies komplikeco pligrandiĝas pro la kreskanta nombro de lingvoj gajnantaj internacian signifon. Pro tio estus dezirinde, ke demandoj de la raciigo de la internacia lingva komunikado pli ol ĝis nun incitu la intereson de la scienculoj, precipe de la prognozistoj, informatikistoj, heŭristikistoj kaj sciencoteoriistoj. Tial la problemoj de planlingvo estu pritraktataj sobre, senemocie kaj sen antaŭjuĝoj.

Provoj, utiligi antikvajn lingvojn por la solvo de la problemoj de internacia lingvo, povas esti diferencigitaj kiel sekvas:

1. Malnova lingvo, plej ofte la latina, estis proponita kiel internacia lingvo ĉefe por la bezono de la scienculoj.
2. Malnovaj lingvoj, ĉefe la latina, estis plisimpligitaj por taŭgigi ilin por la funkcio de moderna internacia lingvo.
3. Estis konstruitaj lingvoprojektoj, kiuj leksike precipe konsideris la internacie uzatajn latinajn aŭ grekajn elementojn.

La limoj inter la 2a kaj 3a grupoj estas ofte fluantaj. La klopodoj pri reenkonduko de malnova lingvo, precipe de la latina, estas tre diversaj.

1. LA LATINA KIEL INTERNACIA LINGVO

La fortega politika potenco de la Roma Imperio zorgis por la disvastigo de la latina en grandaj regionoj de suda kaj okcidenta Eŭropo. Proksima Oriento kaj norda Afriko. La lingvo de la konkerintoj larĝe forpremis la enlandajn lingvojn kaj tielmaniere fariĝis relative unueca komunikilo inter la romiaj kolonioj, kiu ekradiis ekster tiujn regionojn kaj akiris internacian signifon. Post la disfalo de la Imperio en la 4a jarcento p.k. la mezlatina lingvo pluvivis kiel lingvo de la eklezio. La latina fariĝis la internacia lingvo de la eŭropaj diplomatoj, juristoj, scienculoj kaj administrantoj. La latina lingvo, ĝis fino de la mezepoko neniam serioze interrompita en sia lingva kontinuo /2/, facile kapablis adaptiĝi al la sociekonomiaj ŝanĝoj de la feŭdalisimo (ĉefe rilate sian leksikon) kaj pruvis per tio sian grandan vivoforton. Tion ankaŭ atestas riĉa mezlatina literaturo.

La pozicio de la latina estis skuita nur, kiam en la XVIIa jarcento la evoluo de la produktivaj fortoj gvidis al formiĝo de la progresema burĝaro kaj kun tio de la eŭropaj nacioj. Racionalismo anstataŭis pli kaj pli skolastikon kaj mezepokan mistikismon. Komencis la epoko de la naciaj lingvoj. En la jaro 1687 Christian Thomasius (1655-1728) en la universitato de Leipzig prelegis unuan fojon germanlingve. The Royal Society of London (Londona Reĝa Socio) uzis la anglan ekde sia fondiĝo en la jaro 1660, kaj 1710 sekvis la Academie des Sciences (Akademio de la Sciencoj) en Paris, oficiale uzante la francan. La mezepokaj humanistoj, kiuj kiel idealon rigardis la antikvan epokon, kritikis tiutempe la latinan de la mezepoko kaj denove preferis la klasikan latinan. Tio signifis la morton de la mezlatina. La rigide stiligita klasika latina malpli ol la pli fleksebla mezlatina taŭgis por la nomigo de la novevoluiginta nocio. Dum la plua historia evoluo la latina ĉiam malpli estis uzita kiel lingvo de la scienco. Ankaŭ la nombro de la devigaj latinlekcioj en la lernejoj ŝrumpis je minimumo. Ekde la XVIIa jarcento la latina estis perdinta sian signifon kiel internacia lingvo.

Aliflanke ni scias, ke la latina kiel unueca lingvosistemo spite de tiu historie kaŭzita evoluo ĝis hodiaŭ gardis certan seninterrompan tradicion pro sia uzo flanke de la katolika eklezio, kvankam la komunika valoro estas forte limigita. La enciklikoj de la papoj tradicie (sed ne ekskluzive) estas publicitaj en la latina

lingvo. Radio Vatikano krom en 20 naciaj lingvoj ankaŭ disaŭdigas en la latina. Dum la Ila Vatikana koncilio oni debatis latine. Apartan signifon posedas la vivanta kiel internaciismoj kaj fakterminaroj latinida kaj greka vorttrezoro, kiu laŭ Eugen Wüster /3/ povus reprezenti unuecan terminologian partolingvon.

Do ne estas surprizo, kiam baze de tiuj faktoj ĝis la hodiaŭa tago troveblas klopodoj revivigi la latinan kiel internacian lingvon de la scienco. La ĉi-rilatajn strebojn fine de la XIXa kaj komence de la XXa jarcentoj resumas André /4/ kaj Kent /5/. Precipe menciindas M. Georg Henderson, kiu fine de la XIXa jarcento propagandis la klasikan latinan kiel internacian lingvon kaj eldonis la tute latine redaktitan ĵurnalon "Phoenix" /6/. La vortsekvo de la Hendersona Latino estis mezepoka, respektive pli moderna ol klasika. Serio da modernaj nocioj estis nove kreita, ekzemple Poŝta unio - unio postalis; vaporŝipo - naves vaporiae. 1845-1902 aperis, same tute latinlingve, en Philadelphia "Praeco Lathus" (Folia Gentium Latina Menstrua Litteraria ac Critica ed propagandum Sermonem Latinum, nec non ad fovendas Litteras Latinas) kiel ankaŭ en Romo 1898 "Vox Urbis" (de Litteris et bonis artibus commentarius). Ankaŭ en "Vox Urbis" ni trovas novkreaĵojn kiel "electrica lux" aŭ "loricata navis" (milit-ŝipo). 1889-1914 aperis entute 10 diversaj latinlingvaj ĵurnaloj /6a/. Kiam 1922 antaŭ komisionoj de la Ligo de Nacioj oni disputis la "por kaj kontraŭ" de Esperanto, apartan pezon havis la ekspertizo de Gonzague de Reynold kontraŭ Esperanto kaj por la latina kiel internacia lingvo /7/. De Reynold pledis por plisimpligita mezepoka Latino, kies morfologio kaj sintakso estu regulitaj de internacia konferenco de filologoj. 1923 la Ligo de Nacioj enketis ĉe la germana regna ministero por internaciaj aferoj, ĉu en Germanio en pli grava grado la latina kiel internacia lingvo estas praktikata, kion oni neis /8/. Ankaŭ en la ĵurnalo "Das Humanistische Gymnasium" fine de la republiko de Weimar oni multe diskutis la demandon de Latino kiel internacia lingvo /9/.

Plej grandan intereson por "vivanta Latino" kompreneble montras la Vatikano. Sed en la de ĝi eldonita "Latinitas", la sola ĝis hodiaŭ aperanta en latina lingvo ĵurnalo kaj en la vortaro de Antonio Baccis /10/ tre klare videblas la malfacileco de la traduko de modernaj nocioj en la latinan, ekzemple atombombo - pyrobolus; globus atomica vi displodens (fajroglobo, globo eksplodanta per atom-

forto), bombaviadilo - velivolus ignivomis globis verberana (aviadilo pafanta fajrovomantajn globojn), komunisto - aequandorum bonorum fautor (advokato por egaleco de la distribuo de havaĵoj).

En pli nova tempo apartan mencion meritas la adeptoj de "Latin vivant". Grupo da latinistoj, ekleziuloj kaj aliaj interesitaj je la vasta uzo de la latina scienculoj 1956 en Avignon, 1959 en Lyon kaj 1963 en Strasbourg /11/ aranĝis kongresojn, en kiuj, parte per la Latino de Cicero, estis diskutitaj demandoj de la pli vasta internacia uzo de la latina kaj la por tio necesaj antaŭkondiĉoj. La diversaj prelegoj pritraktis demandojn de la prononco, didaktikajn metodojn, morfologion, sintakson kaj leksikon. La ellaboritaj rekomendoj, i. a. pri intensivigo kaj modernigo de la instruado de la Latino, pri eldono de latinaj ĵurnaloj, pri fondo de specialaj lernejoj kun nura latinlingva instruado, estis internacie apenaŭ atentitaj, ĉar ili evidente ne harmoniis kun la sociaj bezonoj. Tiujn faktojn ankaŭ konsideras la instruado de la latina en la socialisma ŝtataro. J. Irmscher atentigas en sia publicita okaze de la kongreso en Avignon raporto, ke en la socialisma ŝtataro "la premisoj por la reuzado de la latina kiel vivanta lingvo estus relative malgrandaj, ĉar latininstruado en la gimnazioj, se ĝi ekzistas, nenie celas la parolkapablon, sed la receptivan alproprigon de la lingvo kaj la per ĝi perataj edukvaloraĵoj" /12/. En la ĵurnalo "Gymnasium" Wassermann /13/ postulis similajn solvojn kiel la kongresoj "Latin vivant". Pri la kongreso 1956 en Avignon raportas en sama ĵurnalo Stricker /14/. Ankaŭ 1966 J.M. Borovskij (Leningrad) publicis artikolon: "La latina kiel internacia lingvo de la scienco kaj la problemoj de la popolklerigo" kaj pledis denove por la enkonduko de la latina kiel internacia lingvo de la scienco /15/. Ankaŭ Irmscher 1970 atentigas pri tiu demando /16/.

Inter aliaj povas esti cititaj jenaj kialoj kontraŭ la reuzo de la latina kiel internacian lingvon:

- a) La vorttrezoro de la Latina servis al la nomigo de nocioj, kiuj ekestis antaŭ du jarmiloj. La nomigo de modernaj nocioj per la ekzistanta vortmateriale starigas komplikajn problemojn.
- b) La kreado de neologismoj parte eblus, sed vide al lingva ekonomio, precizeco kaj oportuneco la noci-nomigado fariĝus ĝenerala problemo. La ligita kun tio ampleksa kaj neevitebla interveno de lingvonormistoj egalus al plena transformo de la leksiko, ĉar la necesaj por la scienco multcentmilaj terminoj

plej rapide postulas latinajn ekvivalentojn.

La nomigo de modernaj nocioj, ekzemple el scienco kaj tekniko, tamen estas pli facile solvebla per moderna planlingvo. Tion Wüster /17/ ekzemple konvinke pruvis por Esperanto.

- c) Se la strukturo de la latina restus netuŝita, tiu lingvo restus malfacile lernebla, kaj nur edukita elito ĝuus la privilegion regi ĝin. Larĝaj laborulaj tavoloj tiam apenaŭ povus partopreni la internacian komunikadon.

Kompreneble estas prave, ke la latinida leksiko ludas signifan rolon por la nomigado de novaj nocioj el scienco kaj tekniko. Kompreneble ĝi estas konsiderenda por la solvo de la problemo de internacia dua lingvo. Pri tio jam atentigis Otto Jespersen: "Ne necesas atentigi pri tio, ke la latina kulturo kaj per ĝi ankaŭ la latina lingvo per miloj da vojoj enpenetris la modernan vivon kaj ankoraŭ penetras. Neniu tion neas, kaj pro tio tutaj partoj de la latina lingvo nepre devas esti enkorpigitaj en la helplingvon de la estonteco - sed tamen nur tiuj partoj, kiuj pruvis sian vivkapablon por tio, ke ili daŭras pluvivi en la lingvoj hodiaŭ fakte parolataj -, tio estas la pruvilo pri bezoneco aŭ ne". /18/

Tiun principon konsideris multaj el la konstruintoj de planlingvoj, kvankam tre diversgrade.

2. ALIAJ MALNOVAJ LINGVOJ KIEL ILO DE INTERNACIA KOMUNIKADO

Kvankam tre malpli ofte ol la latina ankaŭ la greka /19/ estis rekomendita kiel internacia, dua lingvo. O. Eichthal /19a/ (1864), Boltz (1888) /19b/, Flach (1889) /19c/, Kühlenbeck (1889) /19d/ kaj post la dua mondmilito ankaŭ Christian /20/ proponis la grekan kiel "estontan lingvon de la scienculoj". F. Sack raportas en sia verko /21/, ke ankoraŭ post la dua mondmilito la "Greek Primary Teacher Association" en memorando al la "World Organisation of Teaching Profession" estis rekomendinta la grekan kiel propagandindan mondlingvon /21/. Ekzistis eĉ proponoj, por la funkcio de internacia lingvo, utiligi la hebrean /21a/, kaj eĉ Sanskrit /21b/.

3. MODERNIGO KAJ PLISIMPLIGO DE MALNOVAJ LINGVOJ

Multaj interesitaj pri la praktika solvo de la problemo de mondlingvo scienculoj vidis en la plisimpligo aŭ "modernigo" de la latina vojon por la solvo de la problemo de multlingveco /22/. La "Macaronic-Latino" de la monako T.H.Folongo (1491-1522) estis satire plisimpligita mezepoka Latino kun aldono de ĉefe italaj vortoj: "Vado per hunc boschum solus chiamando aninam" (Mi migras sole tra tiu-ĉi arbaro vokante Giannina-n) /22a/. Ĝi laŭ Manders verŝajne ne celis esti mondlingvo, kvankam kiel tia en la interlingvistika literaturo prezentita /22b/. Ankaŭ Carpophorophilus (pseŭdonimo), germana scienculo, 1734 provis plisimpligi la latinan /22c/. Ekzemple li anstataŭis la deklinacion per artikolo (nom. - ha, gen. - he, dat. - hi, akk. - ho). La finaĵo de substantiva pluralo estis "-im" (domus domusim). Verboj konjugiĝis regule kaj analitike. Fine de la XIXa jarcento amasiĝis la projektoj de plisimpligitaj Latinoj. 1890 Henderson skribis en sia "Latinesce": "Nostre Patre, qui esse in coele, sanctificate esse tue nomine" /22d/, kaj ankaŭ "Communia" de Stempf forte memorigas Latinon: "mi credi, tu essere kontent" /22e/. Komparo de teksto de "Linguum Islianum" (Isly, 1901) /22f/ kun la latina originalaĵo same ilustras la klopodojn gardi la bazajn trajtojn de la latina. Linguum Islianum: "Canum, dum ferabat carnum, natans, per fluminum, videavit suum simulacrum in speculo lymphorum," kaj en latino: "Canis, per flumen carnem dum ferret natans, lympharum in speculo vidit simulacrum suum".

Tiuj kaj similaj provoj neniam akiris praktikan signifon. Sed "Latino sine flexione" /23/ (1903, la verko de la itala matematikprofesoro Giuseppe Peano, pli poste ankaŭ nomita "Interlingua" (ne miksenda kun la samnoma sistemo de Gode, 1951), preskaŭ du jardekojn vekis certan intereson.

"Latino" amplekse resignas la komplikan latinan gramatikon. La verbo, ekzemple, malhavas fleksiojn de persono aŭ nombro (me habe, te habe, nos habe). La funkcion de deklinaj finaĵoj transprenas prepozicioj (vox populi = voce de populo). Ĉar Peano estis fiksinta la bazajn regulojn de sia lingvo tre ĝenerale,

ekzistis samtempe pluraj varioj de "Latino". En ili estis publicita serio da sciencaj eseoj, ekz. pri matematiko, kaj ĵurnaloj /23a/. "Latino sine flexione" memorigas en multaj rilatoj al pli postaj naturalismaj projektoj (komparu ekzemple Gode), ĉefe ankaŭ pro tio, ĉar Peano grandskale transprenis neologismojn el modernaj romanidaj lingvoj, kion montras la sekvonta teksto: "Problema de lingua internationale es proximo ad solutione. Lingua definito per maximo de internationalitate non es lingua artificiale. Suos elementos es plus diffuso et plus naturale, que in omni lingua nationale". /23b/

Projektoj celintaj la plisimpligon de la hebrea devenis de F. Lenz (Pasilingua Hebraica, Neuwied, 1887) kaj A. Nilson (Lasanebr, Gefle, 1897). 1907 La Grasserie publicis "La langue internationale pacifiste au Apoléma" (Paris), projekton bazanta je la greka (antrop - homo, hipp - ĉevalo. mi ecan orexia calo - mi havas belan apetiton). Ankaŭ tiuj projektoj restis sen ia signifo.

4. LATINIDAJ PLANLINGVOJ AŬ PROJEKTOJ

Alie ol la sistemoj pritraktitaj en ĉapitro 3 tuta serio de projektoj ne apogas sin sur malnovlingvaj modeloj sed estas memstaraj sistemoj kun pli aŭ malpli normita gramatiko kaj plej ofte latinida leksiko.

El la ĉ. 700 projektoj, kiuj certe ekzistas ĝis nun, nur malmultaj estis kontrolitaj laŭ la praktiko: mallongan tempon "Volapük" (1879) /24/ (Vola = world, mondo; pük = speak, parolo, lingvo) de la prelato Schleyer el Baden; plengrade "Esperanto" (1887) /25/ de la pola okulkuracisto Zamenhof; en la dudekaj jaroj la projekto de reformita Esperanto, "Ido", (1907) /26/ verkita de Couturat /26a/, en tre limigita grado la naturalisma projekto de la balta matematikinstruisto de Wahl "Occidental-Interlingue" (1922) /27/ kaj "Interlingua" (1951) /28/, kion aŭtoris la germandevena usonano Alexander Gode /28a/, komisiita de la "International Auxiliary Language Association". La plej multaj planlingvoj sekvas gramatike kaj vorttrezore nacilingvajn modelojn. Ili estas precipe:

a) Modifitaj malnovaj (komparu ĉap. 3) aŭ ankaŭ novaj lingvoj (ekz. Basic English de C. K. Ogden (1930) /29/.

- b) Naturalismaj sistemoj, kiuj kvankam posedantaj plisimpligitan gramatikon tamen transprenas la relative malregulan vortfaradon de la romanaj lingvoj.
- c) Sistemoj de skema aŭ aŭtonoma tipo, kiuj disponas kaj pri regulita gramatiko kaj pri regula produktiva sistemo de derivaĵoj el la plej ofte same romanaj radikoj.

La limoj inter tiuj grupoj ofte estas fluantaj. La projektoj por planlingvoj de la XXa jarcento ene de la cititaj grupoj diferencas ĉiam malpli, tiom, ke oni kiel Jespersen, povas ofte paroli pri "dialektoj" aŭ varioj de certa baza tipo /29a/. Sube la grupoj b) kaj c) estu mallonge prezentataj.

Precipe la kripligo de nacilingvaj (ĉefe anglaj) vortoj en la unua, relative sukcesinta planlingvo "Volapük", kiu pro tio ofertis nur malgrandan memorsubtenon, instigis multajn aŭtorojn, elekti la leksikon ekskluzive laŭ nacilingva, ĉefe romana modelo. Unu el la unuaj sistemoj, "Mundolingue" (1890) de la iama Volapükisto J. Lott ("la internacian lingvon ne necesas inventi - ĝi ekzistas; oni nur devas kolekti kaj ordigi ĉiujn ĝiajn vortojn") /29b/ pro tio kiel ĉiuj sekvintaj naturalismaj projektoj ĝis inkluzive "Interlingua" de Gode prezentiĝis kiel certa "altromana": "Amabil amico, con grand satisfaction mi ha lect tei letter de la mundo-lingue. Le possibilita de un universal lingue pro le civilisat nations ne esse dubitabil". La unua tiaspeca sistemo kun praktika signifo estas "Occidental" (pli poste nomita "Interlingue") de Edgar de Wahl (1922). "It" (t.e. la lingvo, D.B.) "deve basar se sur li international formes comun avror european lingues in fonetica, scritura metodes de expression ... do have li aspect de un quasi natural lingue" /30/. "Quasi natural" ĉe ĉiuj naturalisme orientitaj projektoj signifas "romana" kio laŭ lingvosciencia vidpunkto ne povas esti iu defendebla kriterio.

Dum "Occidental-Interlingue" ankoraŭ disponas pri certaj eblecoj de aktiva vortfarado, "Interlingua" (1951, Gode) jam estas tiom "natura", ke la vortfarado sekvas pure romanajn modelojn respektive sin bazas je mezlatinaj formoj. La principoj de vortfarado estas nura etimologio de la latinidaj lingvoj kaj ne plu havas ian signifon por aktiva kaj regula vortfarado. /30a/ Specimenoj de tekstoj montras la parencecon de tiu grupo de planlingvoj: Occidental (1922): "Ante comensar li discussion pri li punctus, quel separa nos, noi vole emfasar, que noi concorda ..." /30/. Novial (O. Jespersen, 1928): "Ante ke nus com-

ensa discusione pri li punctus kel separa nus, nus voli emfasa ke nus concerda ..." /30/. Interlingua (1951): "In le jornal de heri de vostre urbe io ha legite, que vos cerca un contorista" /31/.

La fakto, ke la tekstoj "a prime vista" (je la unua rigardo) estas kompreneblaj por homoj scipovantaj latinidajn lingvojn estas la ĉefa argumento de la reprezentantoj de tiuj lingvoj. Tamen tio ankoraŭ nenion atestas pri la lernfacileco, la flekseco de la lingvo rilate nomigadon de novaj nocioj aŭ pri ĝia uzebleco por reprezentantoj de ne-hindoĝermanaj lingvoj.

Kontraste al Occidental aŭ Interlingua (Gode) "Esperanto" sekvas la romanan modelon nur tiom, kiom al Zamenhof ŝajnis necese por la praktika, facila kaj tamen precize realigebla internacia komunikado. Transpreno de la komplika historia romana ortografio aŭ de la neregula sistemo de derivaĵoj pro tio de si mem malpermesigis. Esperanto hodiaŭ estas la sola ekde pli ol 80 jaroj ĉiuflanke praktike elprovita planlingvo. La taŭgeco de ĝiaj konstruprincipoj por optimuma internacia komunikado estas facile kontrolebla laŭ ĝia konkreta aplikado en la diversaj sferoj de internaciaj kontaktoj /32/.

La plej gravaj karakterizaĵoj de Esperanto estas

1. regula ortografio
2. regula gramatiko kun reguloj validaj por la tuta sistemo
3. leksiko sin bazanta sur internacia kaj pro tio ĉefe romana vortrezoro
4. regula, aktive uzebla kaj tutsisteme valida vortfarado

En la kadro de tiuj kvar ĉefkarakterizaĵoj moviĝas la reformoj de diversaj detaloj, kiuj kaŭzis la ekeston de "Ido" kaj de kelkdek pluraj Esperantidoj.

"Ido" ŝanĝis precipe la ortografion, leksikon kaj vortfaradon, sed ne tiom, ke parolantoj de ambaŭ sistemoj malkomprenus reciproke, kiel atestas sekva tekstspecimeno:

Esperanto (1887): "En la hieraŭa ĵurnalo de via urbo mi legis, ke vi serĉas kontoriston ..." /33/.

Ido (1907): "En la hierala ĵurnalo di via urbo mi lektis, ke vi serchas kontoristo ..." /34/.

La strukturo adaptita al la praktiko tamen ne estas la ĉefa kaŭzo por la ĝis nun unika sukceso de tiu internacia planlingvo. La sekvontaj kaŭzoj certe meritas mencion:

1. La oportuna lingvostrukturo kaj la aranĝitaj en ĝi riĉaj sed sistemkonvenaj eblecoj por evoluo.
2. La evoluo de Esperanto dekomence gvidiĝis per praktika aplikado kaj ne per la arbitra volo de ĝia konstruisto.
3. Streĉoj per tradukoj de altnivelaj mondliteraturaĵoj kaj la eldono de multaj originalaj verkoj akcelis kaj stabiligis la evoluon de la lingvo.
4. La decida bazo por la stabila kaj unueca evoluo de Esperanto estis la akceptata jam 1905 deklaro pri la deviga validado de la "Fundamento de Esperanto", la sistem-dokumentado de Esperanto, kiu ofertis sufiĉe da movolibero por la evoluo de la lingvo laŭ la skizitaj vojoj.
5. Fine de la XIXa kaj komence de la XXa jarcentoj la utopie-pacifisma sed burĝe-humanisme orientita ideologia fono de la evoluo de Esperanto, kiu rudimente pluvivas ĝis hodiaŭ apud realisma aŭ socialisme orientita movado, kreas la necesan interligon de lingvo kaj socio.

5. LATINAJ ELEMENTOJ EN LA LEKSIKO DE ESPERANTO

La defendo de la latina vortrezoro en planlingvo (O. Jespersen) ankaŭ validas por Esperanto. La vortrezoro de Esperanto konsistas ĉefe el latinidaj (ekz. funkcio, instituto, labori, interesa), grekaj (geografio, teleskopo) aŭ el aliaj fontoj. baziĝantaj je internaciaj vortoj. La asimilado de internacie kutimaj vortoj estas unu el la plej gravaj leksikologiaj principoj de tiu lingvo kaj estas formulita jam en la 15a regulo de la "Fundamenta Gramatiko": "La tiel nomataj vortoj fremdaj ... estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo ricevante nur la ortografion de tiu-ĉi lingvo ..." /35/. Modernaj vortoj kiel sputniko, kosmonaŭto (apud astronaŭto), komputero (apud komputoro) aŭ prognozo pro tio facile eniris Esperanton. Kaj en la studo pri la vortrezoro de la "Universala vortaro" de D.B. Gregor /36/ kaj en la "Naŭlingva leksikono" /37/ de L. Bastien, kiuj esploras la vortrezoron de 1893 respektive 1950, klare montriĝas la latinida karaktero de la Esperanto-leksiko. Gregor publicas kiel rezulton de sia analizo: anoj de la romana lingvofamilio scipovas kompreni 79,33%, tiuj de la

ĝermana lingvofamilio 62,05% kaj parolantoj el la slava lingvofamilio 26,29%. Kiom ajn dubindaj la detaloj de tiu-ĉi statistiko eble estus, ĝi tamen klare montras karakterizaĵon de la leksiko de Esperanto: ĝian latinidecon. La aperinta 1970 (kun 1300 paĝoj la ĝis nun plej ampleksa) "Plena Ilustrita Vortaro" /38/ certe indus esti analizita laŭ tiu aspekto. Elektinte la leksikon, Zamenhof lasis sin gvidi laŭ la internacie disvastigitaj formoj, sed okaze ankaŭ revenis al latinaj.

Modrijan /39/ provas dokumenti rektan influon de la latina je Esperanto kaj konstatas konsiderindan nombron da akordoj. Laŭ tio, ekzemple, tuta serio de Esperanto-substantivoj samas al la 3a latina deklinacio (inter alie hirundo, homo, ordo). Fonetike esperantigita ni retrovas ekzemple: draco (drako), carbo (karbo), visio (vizio).

La karakteriza por la Esperanto-substantivo finaĵo "-o" estas algluita al vortoj kiel ekzemple par, aer, odor, index (paro, aero, odoro, indekso).

Fonetike kaj ortografie adaptitaj aperas latinaj vortoj kiel ekz. exemplar (ekzemplero), arbor (arbo), culex (kulo), mares (maro), aqua (akvo).

Esperanto-adjektivoj ĉiam finiĝas je -a. Pro tio ekz. el bellus, -a, -um; densus, -a, -um; crudus, -a, -um; fariĝas bela, densa kaj kruda.

La Esperanto-finaĵo -e por derivitaj adverboj (ĝi kantas bele) ekzistas ankaŭ en la latina, ekz. necesse est (estas necese), facile est (estas facile). El la latina ne-derivitaj adverboj kiel nunc, cum, heri en Esperanto nomiĝas nun, kun, hieraŭ. Tre multaj verboj en Esperanto estas kompareblaj kun latinaj formoj, ekz. el la 1a konjugacio admirari, gratulari, acclamare), el la 2a konjugacio florere, persuadere, exercere).

Latinaj prepozicioj kiel apud, de, inter, pro, per, sub, super, trans, troviĝas kun simila signifo ankaŭ en Esperanto, same kiel, iomete ŝanĝite, antaŭ, ĉirkaŭ, kontraŭ, kun, en, sen (ante, circa, contra, cum/con, in, sine).

Tiuj malmultaj ekzemploj validu kiel pruvo por la forta latinideco de Esperanto, latinideco, kiu estas unu el la kaŭzoj de la bonega internacia memorhelpo de Esperanto.

La prezento de vojoj kaj misvojoj de lingvoplanintoj certe estas plaĉa kaj instrua, tamen necesas dediĉi al la en la praktiko funkcia Esperanto la meritatan atenton. Tio kondiĉas kompreneble forlason de serio da ne laŭtempaj antaŭ-

juĝoj kaj malkorektaj imagoj, evidente nesufiĉe kontrolitaj laŭ la praktiko. La neceso de nacia lingvo-planado ne plu povas esti kontestita. Internacia lingvo-planado, kontraŭe al tio, en multaj sferoj estas rigardata kiel nenecesa, ne dezirinda aŭ eĉ ne ebla. Marx kaj Engels rimarkas en "La germana ideologio" (20): "Ke la individuoj siaflanke komplete prenos sub sian kontrolon ankaŭ tiun produkton de sia specio (la lingvon, D.B.) kompreniĝas per si mem". Pro kio tio ne validu ankaŭ por la internacia lingva komunikado?

Konsiderinda materialo, plejparte tute ne konata al neinterlingvistaj rondoj, atendas sian bibliografian prilaboron kaj uzon por la esploro.

LITERATURO:

1. Scientific and Technical Translating and other Aspects of the Language Problem. UNESCO, Paris 1958, p.13
2. J. Schneider: Gesellschaft und Sprache im Spiegel des mittellateinischen Wortschatzes; En: Zum Nachleben des Lateinischen in der Feudalgesellschaft, Berlin 1969, p.20 kaj poste.
3. E. Wüster: Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik (Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung), Bonn 1966, p.420 kaj poste.
4. Ch. André: Le Latin et la problème de la langue internationale, Paris 1903
5. R. G. Kent: Latin as the International Auxiliary Language, en Classical Journal, Philadelphia, 18.1.1922, p. 38-44
6. Mario Pei: One Language for the World (and how to achieve it), New York 1961, p. 100 kaj poste, 2a eldono.
- 7a. cit. loko p. 100
- C. Agostini - P. Marelli: Il latino lingua internazionale? Federazione Esperantista Italiana, Ufficio Informazioni, Documento N. 4, Milano 1959, p. 11 kaj poste
- E. Drezen: Historio de la mondlingvo. Tri jarcentoj de serĉado, dua esperanto-eldono. Leipzig 1931, p. 88; p. 136 kaj poste

7. G. de Reynold: Le problème de la langue internationale (Bibliothèque Universelle et Revue de Genève), Genf 1925. p. 604-632. p. 745-769
8. Dokumentita ĉe R. Krug: Die Stellung des Mittel und Neulatein an den deutschen höheren Schulen. fil. doktora dis., Berlin 1971. p. 80.
9. -W. Reichardt: Latein als Gelehrtensprache, Das humanistische Gymnasium, n-ro 39, 1928, n-ro 40, 1929;
-H. Lamer: Über den Ursprung der Apotheken. Latein als Sprache internationaler Kongresse. Das humanistische Gymnasium, n-ro 39, 1928.
10. A. Bacci: Lexicon eorum vocabularum quae difficilium latine reduntur, Typis Poliglottis Vaticanis 1949.
11. -Premier Congrès international pour le latin vivant, Avignon 1956, eldonita de E. Aubanel, Avignon, sen jaro
-2-ème congrès international pour le latin vivant, Lyon-Villeurbanne 1959, eldonita de E. Aubanel, Avignon. sen jaro.
12. Komparu 2-ème congrès ..., samloke. 174
13. F. Wassermann: Weltsprache Latein und der Russisch-Chinesische Vertrag von Nertschinsk, Gymnasium n-ro 61. 1954. p. 439-441.
14. F. Stricker: Der internationale Kongress für lebendiges Latein in Avignon (traduko de ne citita franca fonto), Gymnasium n-ro 63, 1956, 544-547
15. M. Borovski: Латинский язык как международный язык науки и вопросы народного образования (La latina kiel internacia lingvo de la scienco kaj la demandoj de la popoloedukado). Leningrad 1966. p. 17-25. komparu Bibliotheca Classica Orientalis n-ro 13, 1968. p. 380 kaj poste.
16. J. Irmscher: Latein als internationale Sprache? Horizont, Berlin. n-ro 45/1970 (1. Nov.)
17. Komparu Wüster, cit. loko
18. O. Jespersen: Eine internationale Sprache, Heidelberg 1928. p. 9
19. Rilato tion komparu: L. Couturat - L. Leáú, Histoire de la langue universelle, Paris 1903
A. Guérard: A short history of the International Language Movement, London 1922
E. Drezen: Historio ... cit. loko
M. Pei: cit. loko
- 19a. Eichtal, G.: De l'usage pratique de la langue grecque, Paris 1864
- 19b. Boltz, August: Hellenisch, die allgemeine Gelehrtensprache der Zukunft, Berlin/Leipzig 1888
- 19c. Flach, Johann: Der Hellenismus der Zukunft, Leipzig 1889
- 19d. Kuhlbeck, Ludwig: Das Problem einer internationalen Gelehrtensprache und der Hellenismus der Zukunft, Leipzig 1889

20. M. D. Christian: Greek as an International Language, New York, 1946
21. F. L. Sach: The Problem of an International Language, Washington 1951
- 21a. Le Dain, A.: La linguistique vulgarisée, Paris 1886, p. 9
- 21b. Monnerot-Dumaine, M.; Précis d'interlinguistique générale et spéciale, Librairie Maloine, Paris 1960, p. 18
22. Komparu: L. Couturat - L. Léau: cit. loko
A. Guérard: cit. loko, p. 57-71
- 22a. Komp. Nodier, C.: Du Langage factice appelé macaronique, Paris, Techner 1834
Komp. E. Drezen: Historio, cit. loko
- 22b. Komp. Manders, W.: "Latino macaronico" en Esperantologio, Kopenhago, vol. II, 2, p. 136 kaj poste
M. Pei: cit. loko
- 22c. Komp. Couturat, L./Léau, L.: cit. loko, p. 23-24
- 22d. Henderson, G.: Latinized English (Latinesce) The Referee, London, Jan. 1909
- 22e. Stempf, J.: Communia oder internationale Verkehrssprache, Kempten, 1894
- 22f. Isly, Fred: Langue Isly (linguum islianum, Projet de Langue internationale, Paris 1901
23. G. Peano: De Latino sine flexione, La Revue de Mathématique, n-ro 8, 1903
- 23a. kp. Drezen, E.: Pri problemo de internaciigo de sciencoteknika terminaro, Moskvo-Amsterdam (Standardgiz EKRELO) 1935, p. 8
- 23b. Drezen, E.: Historio ... cit. loko, p. 138
24. M. Schleyer: Volapük, die Weltsprache. Entwurf einer Universalsprache aller Gebildeten der ganzen Erde, Sigmaringen 1880
25. (Zamenhof) Dr. Esperanto: Meŝdunarodnij jazyk. Predislovie i polnij učebnik, Warszawa 1887
26. L. de Beaufront: Komplete Gramatiko Detaloza di la Linguo Internaciona Ido, Esch 1925
- 26a. Kiel R. Berger pruvis ne L. De Beaufront sed Louis Couturat estas la vera aŭtoro de Ido, kp. Li ver historie del lingue international, Cosmoglotta, Nr. 5 (116), aŭgust 1937
27. E. Pigal: Occidental, die Weltsprache, Stuttgart 1930
28. A. Gode - E. Blair: Interlingua, A Grammar of the International Language, New York 1951
- 28a. Estas granda farso aserti, ke Interlingua estas "kolektiva kreaĵo" de la lingvistiocieto JALA. Fakte Gode aŭtoris la lingvon laŭ sia imago. Kp. Cosmoglotta n-roj 258 (januaro/marto 1970), 259 (aprilo/junio 1970)
29. C.K. Ogden: The ABC of Basic English, London 1936

- 29a. Kp. Jespersen: cit. loko, p. 34
- 29b. Kp. Drezén, E.: Historio ... cit. loko, p. 154
30. E. de Wahl - O. Jespersen: Discusiones inter E. de Wahl e O. Jespersen. Chapelle-Schweiz, 1935, p.4.
- 30a. Kp. - La kritikojn i. a. de Wüster, cit. loko p. 336-342;
- Manders, W.: Interlingvistiko kaj esperantologio, Purmerend, 1950, p. 20 k.t.p.; Gilbert, W.: Planlingvaj problemoj, La Laguna (Stafeto) 1962
31. En la ĵurnalo de via urbo de hieraŭ mi legis, ke vi serĉas kontoriston. cit. laŭ Waringhien, G.: Lingvo kaj vivo, La Laguna 1959 p. 102
32. Komparu "der esperantist". Mitteilungsblatt der Esperanto-freunde im Kulturbund der DDR, aperadas ekde 1965 kaj raportas pri la Esperanto-movado en GDR kaj eksterlande. Ĉe Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio sin okupas pri la sciencaj aspektoj de la problemoj de planlingvo.
Kp. Lapenna, I./Lins, U./Carlevaro, T.: Esperanto en perspektivo. London - Rotterdam 1974
33. Komparu citaĵon 30
34. " " 30
35. L.L.Zamenhof: Fundamento de Esperanto, naŭa eldono kun enkondukoj. Notoj kaj lingvaj rimarkoj de d-ro A. Albault, Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande 1963, p. 67, koncizige tradukita el la germana originalo.
36. D.B.Gregor: La fontoj de Esperanto, Sciencia Revuo, n-ro 9, 1958, p. 92-115
37. L. Bastien: Naŭlingva etimologia leksikono, London 1950
38. "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto", SAT, Paris 1970. komparu mian recenziĝon en Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationswissenschaft, Berlin 1973, nr. 1-2, paĝoj 144-150
39. F. Modrijan: Elementoj latinaj en Esperanto, Ljubljana 1940
40. K. Marx - F. Engels: Die deutsche Ideologie, Berlin 1960, p. 448

*/ La esperanta versio cit. laŭ L.L.Zamenhof: Unuaj libroj por esperantistoj, eldono Ludovikito, Kameoko (Japanio), 1973, paĝo 39